



la infopmilo

informbulteno pri esperanto

BULLETIN BILINGUE D'INFORMATION SUR L'ESPERANTO

ELDONISTO : esperanto-federacio de ORIENTA FRANCO

Editeur : Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto
Maison des Jeunes et de la Culture
27, rue de la République - NANCY -

Trimestriel
Nouvelle série
N°5
1er trimestre 1974



Abonnement
Un an : 5F
1e N° : 1,25 F
(1 jaro : 6 internaciaj
respondkuponoj)

59-a Universala Kongreso de Esperanto

27 JUILLET-
3 AOUT 1974

★ L'INVITATION DU PREMIER MAGISTRAT DE HAMBURG

"Selon la constitution de Hambourg, il revient à la ville libre hanséatique d'être l'intermédiaire de tous les peuples de tous les continents, dans un véritable esprit de Paix. C'est à des rencontres et à des dialogues internationaux qu'est spécialement destiné le nouveau "Congress Centrum Hamburg", qui accueillera le 59ème Congrès Universel d'Espéranto auquel participeront des délégués de plus de 50 nations. Aussi c'est dans cette optique de compréhension mutuelle et de progrès sur le chemin de la Paix que je souhaite la bienvenue aux délégués et aux invités du Congrès dans notre ville de Hambourg, cité ouverte à tous les peuples".

Peter SCHULZ

N.B.- A la date du 8 décembre 1973, plus de 400 délégués de 37 pays se sont déjà inscrits pour participer au Congrès.

* L'ESPERANTO A LA TELEVISION FRANCAISE.

Après France-Culture, la télévision vient de consacrer à son tour deux reportages importants à la diffusion de l'espéranto dans notre pays. Dans le cadre des actualités régionales, le 4 novembre 1973, les téléspectateurs de l'Est de la France ont pu assister à un cours d'espéranto par la méthode directe, cours dirigé par le Président de notre Fédération, M. J.-P. COLNOT. L'émetteur Languedoc-Roussillon diffusait à son tour le 15 décembre une interview de M. Llech-Walter, un des pionniers de l'E° en France, interview filmée d'abord dans la rue du Dr Zamenhof, créateur de la langue, et ensuite au siège de la Fédération Languedoc-Roussillon. Ces deux émissions ont suscité d'autant plus d'intérêt qu'elles étaient diffusées à une heure de grande écoute.





UN NOUVEAU TIMBRE-POSTE AVEC TEXTE EN ESPERANTO

Ce timbre, imprimé sur une carte spéciale, a été émis le 28 décembre 1973 par les Postes Hongroises, et sa diffusion rapide lui confère déjà une valeur importante. Rappelons que de telles impressions postales, aujourd'hui quasi introuvables, ont été éditées par l'Autriche, à l'occasion du vol spécial VIENNE-PHILADELPHIE, et par la Pologne, en 1962, à l'occasion du jubilé de l'espéranto et en 1966 pour fêter 20 années d'activités E^o en République Polonaise.

* LE ROTARY-CLUB ET L'ESPERANTO.

L'organisation britannique, consciente des difficultés de communication entre les différents clubs mondiaux, a présenté une résolution au Conseil du Rotary-International, résolution demandant la mise à l'étude du problème interlinguistique et sa solution éventuelle par l'adoption de l'espéranto.

* UNE REVUE MONDIALE EN ESPERANTO DESTINEE AUX ENFANTS.

"Juna amiko" - "Jeune ami", tel est le titre de cet illustré dont le premier N^o vient d'être édité sous les auspices de la Ligue Internationale des Educateurs Espérantophones. En dehors du fait que son Comité de rédaction soit disséminé de par le monde, la simplicité de la langue le rend également très attractif auprès des adultes commençants.

* Le PRESIDENT DE LA REPUBLIQUE FINLANDAISE reçoit l'Association Espérantiste de son pays.

Réception officielle le 9 novembre 1973 dans un salon d'apparat de la Résidence. Le Président Kekkonen a manifesté à l'occasion de ce contact, le vif intérêt qu'il portait à l'expérience pédagogique à laquelle a participé la Finlande en compagnie de 4 autres pays, et qui a consisté à enseigner en même temps, à des élèves du même âge, un cours élémentaire d'espéranto, cours à la suite duquel les enfants des 5 pays ont été mis en relation.

* DANS NOTRE RUBRIQUE: "L'ESPERANTO DANS LA VIE DE TOUS LES JOURS"

La Compagnie Hollandaise des Wagons-Lits distribue des menus en espéranto à tous les clients des wagons-restaurants. Toujours aux Pays-Bas, les touristes espérantophones trouvent dans 400 Syndicats d'Initiative des blocs de 50 feuilles avec textes bilingues. A l'aide de la feuille traitant le thème désiré (cette feuille est séparable du bloc), il est facile au voyageur de se faire comprendre... sans aucune connaissance de la langue locale.

un événement dans l'audio-visuel...



ASSIMIL présente "L'ESPERANTO SANS PEINE!"
LA METHODE FACILE "AUDIO-VISUELLE"

grâce aux textes enregistrés par des espérantophones de pays divers,

**VOTRE ACCENT SERA PARFAIT,
VOTRE PRONONCIATION IMPECCABLE.**

LA METHODE AUDIO-VISUELLE ASSIMIL EST EN VENTE CHEZ
LES LIBRAIRES ET DISQUAIRES ET MAGASINS QUALIFIES.

La tekstojn por "La Informilo" n°6 vi bonvolu sendi antaŭ la 31a de
marto al: Sr° COLNOT - 15 rue de Lavaux - 54520 LAXOU

LA KOMITATO DE LA ORIENTFRANCA
ESPERANTO-FEDERACIO,
LA REDAKCIO DE "LA INFORMILO"

deziras al vi feliĉon kaj sukcesplenan Novan Jaron 1974 !!!

MULHOUSE, URBO DE NIA FEDERACIA KONGRESO

INVITO AL LA 33a KONGRESO DE LA ORIENT-FRANCA
ESPERANTO-FEDERACIO

Nia ĉi-jara Federacia Kongreso okazos en MULHOUSE
en la restoracio "A L'AGNEAU D'OR", 19 Avenue de Colmar
en la centro de la urbo, proksime de Place de l'Europe,

➡ DIMANĈON, LA 17an de MARTO, je la 9a ◀

(kun park-ebleco malantaŭ la restoracio, tra apuda por-
dego)

La personoj, kiuj deziras partopreni, bonvolu resendi
plej frue la entenitan aliĝilon, por ke ni povu rezervi
la manĝojn.

PROGRAMO KAJ TAGORDO DE LA LABORKUNVENO

1- Ĝenerala kunveno de la
Orient-Franca Federacio.

- Raporto de la sekretario
- Raporto de la kasisto
- Raportoj de la respondeco-
uloj el diversaj urboj.
- Debatoj pri tiuj diversaj
raportoj

kongres-aliĝilo

Mi partoprenos la 33an kongreson en Mulhouse la 17an de marto 1974

Sr°, Sin°, Fin°

Adreso

Bonvolu turni! ➡

Mi rezervas manĝojn por . . . personoj. Mi alvenas je la . . . horo, per

Alvenante jam sabate mi petas rezervon de: 1-lita(j) hotelĉambro(j) 15F - 25F
2-lita(j) " " 20F - 35F

1/ Trastreku tion, kio ne utilas.

2/ Bonvolu resendi ĉi-tiun aliĝilon kiel

eble plej baldaŭ al: Sr° André GROSSMANN, Bât. D2, rue de la Doller, 68110 ILLZACH

-Renovigo de triono de la federacia komitato.

(La mandatoj de la 4 jenaj komitatanoj finiĝas:

Sroj BERGEROT, DENIS, KNECHT, LIENHARDT. Ili bonvolu informi la prezidanton aŭ la sekretarion, ĉu ili rekandidatiĝos aŭ ne. Novaj kandidatoj bonvolu anonci sin prefere antaŭ la kongrestago).

2- Preparo de la nacia kongreso en St-Etienne.

- Studo de la jarraportoj kaj aliaj tekstoj de UFE.
- Elekto de nia delegito al la nacia kongreso.
- Proponoj, rezolucioj, voĉdonoj por ĉi-tiu kongreso.

Je la 12a: fino de la laborkunveno, antaŭmanĝa malstreĉiĝo per promeneto kaj vizito de terasa ĝardeno (en la proksimeco, apud la Eŭropa Turo).

3- 14a30: Komitata kunveno kaj elekto de nova estraro.

- samtempe: ekzamenoj unuagrada; se ebleco, ankaŭ duagrada.
- vizito de la urbo, kun ebleco supreniri la Eŭropan Turon, al la turniĝanta restoracio, kun panoramo al la tuta urbo.
- prezentado de diapozitivoj aŭ filmoj.

★ ★ ★ ★ ★

NI GRATULAS...



★
GESINJOROJ ANDRE KAJ MASAKO GROSSMANN

★
LASAS ALĴATIA LA ĜOJON ANONCI AL VI

LA NASKIĜON DE SIA FRATETO

★
DANIEL

5 - 12 - 1973

RUE DE LA DOLLER

68110 ILLZACH

BAT. 02 _____

_____ FRANCO

★ ★ ★

Nia amiko P. DENIS en Bar-le-Duc, ĵus fariĝis kavaliro en la ordeno de la Akademiaj Palmoj pro sia agado sur la pedagogia kampo.

★ ★

Mi estas kandidato por la nova komitato - Mi ne estas kandidato
Mi sugestas por la post-tag-meza programo:

Mi dezirus trapasi ekzamenon unua-gradan - dua-gradan.

Mi proponas, ke la 34a kongreso okazu en:

POR LA MEMBROJ, KIUJ NE POVAS ĈEESTI: Mi transdonas mian voĉon al
Mi transdonas mian voĉon al la asembleo.

Subskribo:

AKTIVECA RAPORTO POR LA JARO 1972-73

Nia federacia kongreso okazis en la propra sidejo de la Federacio en Nancy, kunlige kun internacia renkontiĝo okazinta la 5-6ajn de majo 1973. Ĉeestis kvindeko da personoj.

Antaŭan jaron ni havis 111 membrojn kaj nun 112 el kiuj 6 ne abonis "La Informilon". Sed 20 aliaj personoj ĝin abonis.

La ĉefa grupo estas en Strasbourg kun 40 membroj. En aliaj urboj ekzistas grupoj ne-oficialaj: en Nancy kun 16 anoj, en Mulhouse kun 10 anoj, en Colmar kun 6 anoj, en Bar-le-Duc kun 5 anoj kaj en Epinal kun 4 anoj.

Publikaj kursoj okazis po 2 en Nancy kaj en Strasbourg, po 1 en Epinal kaj en Bar-le-Duc. Lerneja kurso okazis en Vittel. Por la koresponda kurso estis senditaj el Nancy 31 komunikoj al la regionaj gazetoj, alvenis 170 inform-petoj el kiuj 53 lernantoj enskribiĝis.

Nia Federacio vaste partoprenis la opinio-sondon de UFE, por kiu ni kolektis 414 respondojn. En La Hingrie okazis nia jam kutima renkontiĝo kun 20 partoprenantoj. Federacianoj partoprenis diversajn Esperanto-aranĝojn: Eŭropa Kongreso en Luksemburgo, Universala Kongreso en Beogrado, Lubljana, Primošteno kaj ali-loke.

A. GROSSMANN

N I A V I V O E N . . .

STRASBOURG

Sukcesis la ekzamenojn kaj ricevis la diplomon de Atesto pri simpla Lernado (krom la personoj menciitaj en la Informilo N°2-3) la jenaj ĝelernintoj:

Sro Emile BAUER, Sino Anne-Marie BORRAS, Sino Alice BOUSQUET, Mme BURY-BRAUN, Sino Paulette LACOMETTE, Sino Christine SCHULTZ, Fino Marguerite STEYGER, ĉiuj en Strasbourg. Fino Pascale NOLLINGER en MULHOUSE, Sro Lucien PHILBERT en ILLKIRCH-GRAFFENSTADEN, Sino Nicole BABIN en BEHREN-les-FORBACH. Al ĉiuj ni kore gratulas pro tiu sukceso! (laŭ informo ricevita el Franca Esperanto-Instituto).

NANCY

Parolaj kursoj: Ni anoncis (per 10 gazetkomunikoj, 1400 flugfolioj, 600 prospektoj, aŭ enketiloj, 75 afiŝoj kaj 2 komunikoj en la loka radio) la 2 kursojn, kiuj komen- ciĝis la 22an de novembro en la Centra Junuldomo. La kurso de la 18a45 estas vizitata de 6 ĝelernantoj, en tiu de la 20a30 enskribiĝis 9. Ambaŭ kursoj okazas nun ĉiumarde.

Televida elsendo: Sekve al komunikoj al ORTF la regiona televido filmis la kursojn la 4an de decembro dum pli ol duonhora. Je tiu okazo ni kunvenigis la ĝelernantojn de ambaŭ kursoj. Post klarigoj de la gramatiko de Esperanto kaj respondo al intervjuo, ni prezentis rektmetodan lecionon per la Junulkurso. La televida elsendo okazis sur 2 kanaloj (nigra kaj kolora) la 12an de decembro, je la 19a30 kaj daŭris relative longe (5 ĝis 10 minutojn). La publika intereso ŝajnis tiel granda (pli ol 100 personoj alparolis min en NANCY), ke 2 informkunvenoj estas planitaj: en liceo Jacques CALLOT (Vandoeuvre-Nancy) la 14an de januaro, en Socia Centro "Beauregard" la 25an de januaro. Kursoj funkcios eventuale poste.

J.P. COLNOT

Perkoresponda kurso: Ĝis 31/12/73 ni anoncis nian perkorespondan kurson al la re- gi na gazetaro per 50 komunikoj. Kvankam la plej multaj komunikoj NE APERIS, mi res- pondis ĝis nun al 230 informpetoj (87 venis el la opinio-sondo, 34 el UFE sekve al pagitaj anoncoj, kaj 109 respondis al niaj propraj komunikoj).

Dum la lastaj monatoj finlernis nian unuagradan kurson la jenaj personoj: Fino Germaine ADOLF en ERSTEIN (67) gvidita de Sro ZIPFEL, Sro GERARD BLOESING en OER- MINGEN(67), Sro LOUIS JEANDEL en ST-LOUP-sur-SEMOUSE (70), ambaŭ gviditaj de Sro Pierre ETIENNE (MALZEVILLE-54), Sro Jacques LINDAU en THIONVILLE (57), Sro KLOTZ en ORLEANS. GRATULOJN al ĉiuj!!

L A S T A M I N U T O : nun ĉirkaŭ 240 informpetoj atingis nin.
20 intersemuloj ĵus aliĝis.

SUPERA PERKORESPONDA KURSO

Tiu kurso konsistis el la 2 verkoj de P. DELAIRE "L'espéranto vivant", kaj "Ludoviko en Nederlando". Ĉar la unua el tiuj 2 verkoj ne plu estas trovebla (reeldono ne antaŭvidebla), nia supera kurso nun paneas. Mi dezirus aĉeti malnovajn librojn por ebligi gvidadon de kelkaj pliaj superaj lernantoj. Do se vi deziras vendi malnovan ekzempleron de l'E.V., bonvolu proponi ĝin al Sr° COLNOT - (Prezo laŭ stato de la libro).

NIAJ VIZITINTOJ EN NANCIO

Dum la pasinta somer-sezono vizitis nin en Nancio kaj tranoktis en la Junuldomo, la 2an de aŭgusto, Fin° Pierrette ROYER kaj 3 aliaj personoj el BAUGE, la 10an de septembro gesinjoroj Hermann SCHMID el AUGSBURGO (Germanio). Akceptis ilin lokaj samideanoj por gvidado dum urbvizito. Ni memorigas, ke la anonco en la Jarlibro fe UEA 1972/72 (kaj baldaŭ 74) ĉiam validas: *Esperantistoj sen aĝolimo vojaĝantaj en Orienta Francio rajtas tranokti kaj manĝi en la Junuldomo komforte kaj je favoraj prezoj. ONI NUR ANONCU, KE ONI ESTAS ESPERANTISTOJ (se eble oni mendu antaŭe).*

EB'ecoj pri staĝoj, renkontiĝoj

Ni ankaŭ memorigas, ke ni havas ĉiam eblecojn por organizi restadojn, staĝojn aŭ renkontiĝojn en nia Junuldomo. Mi-mem povas zorgi pri la administra flanko (rezervigo de ĉambro, kunvensalono, manĝo) sed (pro treege limigita, libera tempo) *ne pri starigo kaj gvidado de programoj.* Mi ŝatus, ke anoncu sin aktivuloj pretaj gvidi tiajn aranĝojn, ĉu sub formoj de amikecaj renkontiĝoj, ĉu de seminarioj por trejnado de aktivuloj, formado de kursgvidantoj, k.t.p. Ni povus unu- aŭ dufoje fare organizi tiajn aranĝojn, sendepende de nia regiona kongreso kompreneble.

J.P. COLNOT

INTERESA SCIIGO POR VOJAĜEMULOJ

FET (Esperantista Federacio de La boristoj) en Parizo ĵus planis dusemajnan ferion en GDR (GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO) dum la somero 1974. Tiu vojaĝo al lando ĝis nun ne ofte vizitata de esperantistaj vojaĝantoj povus riveligi tre fruktodona ĉiuvidpunkte.

Tial ni tutevidente konigas la alvokon de Sr° William GILBERT, 30 rue Croix-Montoire à TOURS 37100, respondanto de tiu restado. Fakte ĝi estos organizita de l' Asocio ECHANGES FRANCO-ALLEMANDS, kies sidejo estas en PARIZO.

Ni povas nun informi la legantojn pri la jenaj proponoj:

A - 3/7 - 17/7 en KÜHLUNGSEBORN, ĉe Balta Maro, loĝejo en feridomo "Georgi Dimitroff". PREZO: 1100 F., inkludas aviadilan vojaĝon el kaj al Parizo, dutagan restadon en BERLINO, unu ekskurson en la ĉirkaŭaĵo.

B - 6/8 - 23/8 en OBERHOF, montara regiono de Turingio (sude de GDR) en feridomo "Glückauf". PREZO: 1000 F, inkludas trajnan vojaĝon el kaj al PARIZO, alveno tra la urbo EISENACH. Estas konfirmite, KE EBLAS VOJAGI PER PROPRAJ RIMEDOJ. En tiu kazo la prezo de la vojaĝo estas de kalkulita. Aŭtomobilistoj devos evidente observi kelkajn kondiĉojn koncerne asekurecon.

INTERESATOJ HAVU PASPORTON! LA ĈEFA AFERO KUSAS TIE, KE ESTOS ORGANIZITAJ RENKONTOJ KUN GERMANAJ SAMIDEANOJ... UNIKA OKAZO MONTRI, KE ESPERANTO PER PRAKTIKO, KE ESPERANTO ESTAS LA PLEJ EFIKA INSTRUMENTO KONTRAŬ LA LINGVAJ BARILOJ.

SKRIBU REKTE AL San° GLLBERT, prefere en FEBRUARO.

SEM AJNFINO EN SARLANDO

"Sarlanda Esperanto-Ligo" organizas sian trian "Esperantistan Semajnfinojn" je 27/28 aprilo 1974 en la naturamika domo de KIRKEL/SAAR.

Disvolviĝos tri paralelaj programoj: por komencantoj, progresantoj kaj perfektuloj. Por la tria kurso estas ĝis nun antaŭviditaj jenaj prelegoj:

- 1/ Walter Ehrmantraut: Kio estas informatiko?
- 2/ Reinhard Haupenthal: Religio-Pedagogio.
- 3/ " : La originala romano de Esperanto.
- 4/ Ulrich Lins: Esperanto kiel persukata kaj diskriminaciata lingvo.

Krom tio oni planas diapozitivon prelegon kaj komunan migradon tra la arbaro. Ĉiuj manĝoj estas riceveblaj en la domo mem (je tre moderaj prezoj. Se la dimanĉa vetur-malpermeso daŭrus ĝis tiam, eblus tranokti en la domo ĝis lundo.

Interesiĝantoj sin turnu frue al: SARLANDA ESPERANTO-LIGO, Parkweg 14, D-6601 SCHEIDT Germana Federacia Respubliko.

15a Eŭropa Ferio-semajno en Svislando (EFS)

Organizita de Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj (SAEF), ĝi efektiviĝos ĉi-jare de la 22a ĝis la 28a de septembro 1974 en MAGLIASO, ĉe la bordo de la Lugano-Lago, dekon da kilometroj okcidente de Lugano, facile atingebla per fervojo aŭ aŭto. La programo ampleksas gvidatajn ekskursojn variajn, Esperanto-lecionojn diversgradajn, vesperajn aranĝojn distrajn.

Anoncojn kaj informojn oni adresu al: Sr^o Ernst GLATTLI, SAEF-Sekretario, Laurstrasse 17, CH - 5200 BRUGG (Svislando)

EHOJ EL Bar-le-Duc.

La grupo daŭre aktivas: malfermo de PCK: "GROUPE DES ESPERANTISTES MEUSIENS" - CCP 27 32 V - NANCY. Adreso: 185 rue de Vêel 55000 BAR-le-DUC. - Presado de membrokartoj sendotaj diversdirekten ("simpati-membreco", "ofer-membreco")

La sekretario ĵus estis elektita en la komitato de "ACTION CULTURELLE DU BARROIS" en la kolegio: Membres Actifs Associations.

Lernejkurso: 8 gelernantoj gvidataj de Sr^o Denis.

Monata kunveno: ĉiun duan ĵaŭdon, 12 rue Voltaire en Bar-le-Duc, en kunvensalono de A.C.B.

..... Epinal.

Sinjoro BERGEROT gvidas ĉiumerkrede parolan kurson (unuagradan) kun 4 gelernantoj kaj ĉiuj aŭde superan kurson kun ankaŭ 4 gelernantoj.

ESPERANTO E' LA ĈIUTAGA VIVO

Sekve al la apero en nia lasta "Informilo" de komuniko pri uzo de Esperanto en la nederlanda telefonejoj, ni ricevis el nia jam multjara leganto kaj subtenanto Sr^o Hans BAKKER (Delegito de UEA en AMSTERDAM) intereseĝajn leterojn kaj komunikon, pri kiuj ni publikigas resumon franclingve en tiuĉi n^o.

Ili instigu ĉiun al klopodoj, por ke Esperanto ne estu nur bela kaj interesa, sed ankaŭ donu utilon en la ordinara, internacia vivo! Ni direktas tiun instigon ĉefe al LA KONSILIO DE U.F.E., ĉar fakte en FRANCIIO, ĉio ĝenerale dependas de parizaj instancoj, kaj la ŝlosilo de ĉia agado simila al tiu de Sr^o BAKKER ja troviĝas en PARIZO.

J.P. COLNOT

AL LA AUTOMOBILISTOJ!

Vi certe scias, ke via veturilo povas esti bona reklamilo por nia afero. Multaj el vi veturis al Luksemburgo, Belgrado, aŭ veturos al fakaj esperantistaj renkontoj.

SURVOJE MONTRU LA INSIGNON DE LA Internacia Klubo de Esperantistaj Aŭtomobilistoj: I.E.K.A., KAJ ANKAŬ, se vi povas, aldonu afiŝeton kun la vorto ESPERANTO.

Ni intencas starigi kun UEA grandan reton de delegitoj, fakdelegitoj, SOS - Aŭto-servo, kiuj havos la taskon helpi al la turistoj, kiam okazos paneo; akcidento aŭ turismaj malfacilaĵoj. Ne temas pri teknika helpo, sed nur lingva (traduka).

Ni ŝatus, ke en multaj benzinstacioj, apudstrataj restoracioj, hoteloj, gastejoj, garaĝoj, oni vidu la adreson kaj telefonnumeron de la S.O.S.-delegito en la koncerna regiono.

Por atingi tiun celon, ni bezonas ĉiujn geesperantistojn, kiuj posedas (aŭ ŝoforas) aŭtomobilo(j)n ne nur unuopajn. Tial! - *aliĝu multnombre al; nia fakasocio*. Nur per forta asocio ni povos atentigi la naciajn aŭtomobilistajn klubojn, la aŭtomobil-fabrikojn kaj-vendejojn pri la valoro kaj taŭgeco de nia internacia lingvo por la internacia turismo.

Se vi ne estas ankoraŭ membro de I.E.K.A., sendu tuj la kotizon -DUMVIVAN- de 6F. al :

J. GUILLAUME
66, de Grasse Village
78810 PEUCHEROLLES
P.Ĉ.K. 1899 91 PARIS

COTISATIONS 1974 _____

Le tableau complet des différentes cotisations 1974 à la Fédération, à l'UFE et à l'UEA, ainsi que des abonnements à diverses revues, est paru dans notre précédent bulletin.

Nous ne pouvons consacrer dans chaque bulletin une page entière pour vous rappeler ces chiffres. Nous soulignons que les cotisations 1974 étaient à régler le plus tôt possible au cours du 4ème trimestre 1973. Peu de personnes jusqu'à présent se sont mises à jour. De façon à nous éviter un travail de rappel et d'encaissement s'étendant sur une année entière, voudriez-vous régler dès que possible à notre trésorier, M. Jean CHAPPELLIER, 109 Av. de la Malgrange, 54140, JARVILLE - CCP: NANCY, 399-75. D'avance, merci!

Pour faciliter votre choix, nous rappelons brièvement les différents chiffres de cotisations:

MEMBRES AGES DE MOINS DE 25 ANS: 8F - 34F - 51F - 85F
MEMBRES DE PLUS DE 25 ANS: 8F - 50F - 84F - 118F

Dans tous les cas ajoutez 5F pour l'abonnement à "La Informilo".

Pour plus de détails et pour d'autres abonnements, voyez le précédent bulletin. Rappelons que les membres du groupe de Strasbourg règlent à leur Trésorière, en ajoutant 5F pour le groupe.

AKTIVECO DE LA ESPERANTISTAJ EDUKISTOJ: Esperanto-staĝo (G.E.E.- I.C.E.M.)
en Grésillon - 8a ĝis 19a de julio 1973.

Estis komuna parto de la unua parto de la Grésillon-a periodo (kursoj kaj teknikoj, distroj kaj vesperoj) kaj aparta parto por geinstruistoj (posttagmezaj kunvenoj)

La Prezidento de GEE (Grupo de Esperantistaj Edukistoj) memorigis la sukceson de la pasintjara staĝo kaj la projekton por ĉi-tiu jaro. Li bonvenigis la inviton: S^on SKOVRIND el Danujo ankaŭ instruisto, kiu ĉiutage parolis al ni pri la danaj lernejoj, programoj, metodoj, horaroj, ktp.

Okazis bona interŝanĝo de ideoj:

- pri internacia korespondado en lernejoj.
- pri la ĵus aperinta infana gazeto "Juna Amiko" (petu provnumeron al Marcelle TURIN 43 rue E. Magnin, 25300 PONTARLIER: 1F20 + sendkosto)
- pri ekspozicio COPERNIC organizita de nordaj kolegoj dank' al infan-desegnaĵoj.

Interalie estis ankaŭ decidita la daŭrado de la traduko de "Les Dits de Mathieu" de Freinet. *La tradukemuloj bonvolu sin turni al G. TURIN, ĉi-supra adreso!*
Antaŭdankon!

oooooooooooooooooooo

LA NACIA KONGRESO DE U.F.E. OKAZOS LA 31an de MARTO EN St-ETIENNE. NEPRE ALIĜU!

Imprimé par les soins du Secrétariat des Associations - 12, Rue Voltaire - Bar-le-Duc -
Le Gérant : J.P. COLNOT - Dépôt légal n°245